
Turangulo 24 Luko




4-a trimestro 2011

En tiu numero vi legos..



Okaze de la jarfinaj festoj, Dominique Baron ofertas al vi ĉokoladon.	p.1 p.2
Helena Tlachova raportas pri sia vojaĝo en Francio.	p.2 ĝis p.5
Franca Cipriani pledas por la uzo de speco de rozo, kiu malbonodoras sed bone kuracas. Ŝi aldonas recepton.	p.5
Post klarigoj pri bildoliteraturo en T. L. n° 20, Jean-Louis Le Brizault prezentas la mangaon : "Nudpieda Gen".	p.6 p.7
Ni ricevis nur unu proponon por kompletigi la vezikojn de la eta bildstrio proponita de J-L Le Brizault en T.L. n°21 : tiun de Pino Lalli.	p.7
Ĉu vi rimarkis ke la horloĝoj prezentitaj en katalogoj aŭ en montrofenestroj preskaŭ ĉiam indikas 10 : 10 ?	p.8

La kakaujo estas daŭrfolia arbo, el la familio de la sterkuliacoj, kiu kreskas en la tropikaj regionoj. En la naturo, ĝi estas alta je 12 ĝis 15 metroj kaj, kiam ĝi estas kultivata, je 4 ĝis 10 metroj. Ĝi ekproduktas, kiam ĝi havas 4 aŭ 5 jarojn kaj plej produktas inter 10 kaj 25 jaroj. La kakaujo havas maldikajn, ledecajn foliojn, tre malgrandajn flavajn florojn, kiuj grandnombre aperas ankaŭ sur la trunko. Nur unu floro el cent naskos fruktojn. La frukto estas 15-25 cm longa, kukumosimila kun dika, ligneca ŝelo kaj kvin vicoj da grajnoj. Estas du rikoltoj ĉiujare.



Ekzistas tri specioj de kakaujo:

- **la kriolo**, kultivata en centra Ameriko (malpli ol 5% el la tutmonda produktado) kun dolĉa gusto, ĉefe uzata en luksaj ĉokoladaĵoj.
- **la forastero**, kultivata en okcidenta Afriko, en Brazilo kaj Ekvadoro (80% el la tutmonda produktado) kun forta amareco.
- **la trinitario**, plantita de la hispanoj en la 17a jarcento en Trinidado, disvastiĝis iomete ĉie en la mondo (15% el la tutmonda produktado). Tiu hibridaĵo heredis la fajnecon de la kriolo kaj la fortikecon de la forastero.

La Olmekoj komencis la kultivadon de la kakaujo mil jarojn antaŭ nia erao. La majaoj utiligis la kakafabojn kiel monunuojn. Tiel sklavo valoris 100 fabojn, kuniklo 10, meleagrinovo 3, tomato unu aŭ du fabojn. Laŭ la legendo, la azteka dio-reĝo Kvetzalkoatlo, ĝardenisto de la paradizo, donacis la kakafabon al la homoj. Moktezumo, azteka imperiestro de 1440 ĝis 1469, estis fama, ĉar li kutimis trinki 50 boteletojn da ĉokolado ĉiutage. La aztekoj kultis ĉokoladon pro ĝiaj afrodiziaj kvalitoj. Tamen la azteka ĉokolado estis amara, ĝi estis farita

per pistitaj faboj, spicoj kaj bolanta akvo. La hispanoj dolĉigis ĝin per kansukero, agavsuko, mosko kaj vanilo. La sankta libro de la Majaoj, 'La Popol Vuh', atribuas la malkovron de la ĉokolado al la dioj.

En 1494, Christophe Colomb ĵetas en la maron la fabojn, kiujn la aztekoj donacis al li, ĉar li konfuzis kun fekaĵoj de kaprino. Do pli malfrue, en Julio 1502 sur la insulo de Guanaja, li gustumis por la unua fojo la ĉokoladan trinkaĵon. Hernan Cortes estas la unua, kiu enkondukas la ĉokoladon en Eŭropon (1528).

Anno de Aŭstrujo, infantino de Hispanujo, edziniĝante al la franca reĝo Luizo la Dektria, enkondukis la pasion por la ĉokolado en Francujon en 1615. La kardinalo de Richelieu (1585-1642), konsilisto de Luizo la Dektria, trinkis ĉokoladon por kvietigi sian lienon kaj pacigi sian koleriĝon.

Mazareno (1602-1661), ministro de la regentino Anno de Aŭstrujo, vojaĝis ĉiam kun sia propra ĉokoladisto. Mario-Terezo de Aŭstrujo (1638-1683), kiu edziniĝis al Luizo la Dekvara, reĝo de Francujo en 1660, deklaris, ke ŝi havis nur du pasiojn : la ĉokolado kaj la reĝo.

Jen kelkaj datoj kaj nomoj :

La industrio de la ĉokolado disvolviĝis en Eŭropo fine de la 18ª jarcento. La unua mekanika fabriko estis kreata en 1780 en Bristol de Joseph Storrs Fry.

La unua svisa fabriko estis kreata de François-Louis Cailler en 1819. Ses jarojn pli malfrue de Philippe Suchar kaj en 1830 de Charles-Amédée Kohler.

La unua fabriko en Francujo estis fondata de Jules Pares en 1814 apud Perpignan.

En 1828 en Nederlando, Coenraad Johannes Van Houten patentigis inventaĵon pri pulvorĉokolado.

En 1847 la kompanio Fry de Bristol muldis la unuan ĉokoladtabuleton.

En 1853 Menier mendis al Gustave Eiffel la konstruadon de sia ĉokoladfabriko en Noisiel (Seine-et-Marne) kaj fariĝis en 1869 la unua monda produktanto.

Victor Auguste Poulain, siavice, konstruigis fabrikon en 1862, sekvata de Henri Nestlé en 1867 (Vevey, Svisujo). En la sama jaro, John Cadbury fondis fabrikĝardenon en Britujo.

En 1879 en Svisujo Rodolph Lindt inventis la konĉan procedon por homogenigi la paston. La konĉoj utilas por delikate movi la paston (kelkfoje dum pluraj tagoj) por elstarigi ĝian aromon kaj oleecigi ĝin.

En 1923 Franck Mars inventis en Ĉikago la unuan ĉokoladstangon.

En 1912 en Belgujo, Jean Neuhaus inventis la pralinon.

Dominique Baron

● ● ● ● ● ● ● ● ●

Nia libertempo en Francio de la 20-a ĝis la 30-a de junio 2011

Nia vojo komenciĝis en Uherský Brod kien alveturigis nin najbaro. El Uherský Brod ni forveturis je la 2-a kaj duono posttagmeze. La trajno estis senhalta ĝis Prago, kie ni alvenis je la sepa kaj duono. Poste ni prenis metroon ĝis sekvanta haltejo. En Prago ni atendis autobuson dum preskaŭ 3 horoj, kaj je la 22-a kaj duono ni forlasis Pragon. La vojo estis agrabla, la aŭtobuso estis plena de pasaĝeroj.
En Parizo ni alvenis je la 13-a kaj 15 minutoj, ni atendis 1 horon ĉar en Parizo estas ŝanĝostacio : tie haltas ĉiuj autobusoj « Eurolines », kiuj veturas tratuta Europo. En la urbo Tours ni havis 1 horon da malfruiĝo, sed felice tie atendis nin Jacques kaj Marie-France Gaumé, Françoise Fouquet kaj Solange Fillon.



Estis tio granda kaj agrabla bonvenigo. La familio Gaumé mi jam konis, ĉar mi kaj mia najbarino Maria ni vizitis ilin en jaro 1992 kaj kun mia edzo Tomaš en la jaro 1994. Post tre longa vojo ni estis iom lacaj, tial ni iris dormi je la 22-a.

21.6.2011- dua tago : ni promenis en Chanceaux kaj admiris la ĝardenon de Marie-France. Ni vidis, ke malantaŭ la ĝardeno estas multe da novaj domoj kaj nova Super U, kie ni povis aĉeti.

22.6.2011- tria tago : ni vizitis Super U, kie nia najbarino Maria aĉetis ŝuojn, mi kaj mia edzo Tomaš kelkajn donacetojn por familio kaj geamikoj. Ni tagmanĝis kun niaj amikinoj Françoise kaj Solange ĉe familio Gaumé, kie Marie-France preparis tre bonan manĝon. Mi skribis posttagmeze multe da poŝtkartoj por miaj geamikoj kaj mi iris kun Jacques en poŝtoficejon sendi ilin. Poste ni vizitis Tours, kie ni trarigardis memorindaĵojn kaj preĝejon Sankta Marteno, kiu tre plaĉis al mi. Sur placo plena de junaj homoj ni sidis kaj trinkis kafon, ni travivis belan tempon ĉar la vetero estis tre varma. Poste ni vizitis Esperantan klubon en Tours, kie nin atendis geamikoj de



Jacques, memkompreneble. Tiu kunveno estis utila por mi : mi ekkonis Esperantistojn el Tours, mi estis surprizita ke Esperanton lernas plej parte plej aĝaj homoj. Ili demandis min pri diversaj aĵoj, mi timis, ke mi ne sciu respondi. Ni disiĝis kiel bonaj amikoj.

23.6 ĵaŭdo : kutime ni elitiĝis je la 7-a. La vetero estis senĉese varma : ni devis kunporti ĉiun tagon grandan botelon da akvo. Je la 9-a kaj duono, ni veturis al Tours, ni vizitis grandan muzeon : « musée du compagnonnage », kie ni povis vidi multe da aĵoj tre malnovaj kaj altvaloraj. Vizitis ĝin multe da homoj. Ĉirkaŭ tagmezo ni alvenis ĉe geamikoj de familio Gaumé : Pierrette kaj Claude Monselet. Tre agrablaj homoj, Pierrette parolas Esperante. Ŝi diris



ke sia Esperanta amiko loĝas en Strážnice. Ni tre bone babilis kune kaj post tagmanĝo ni promenis ĉe rivero Loire, poste ni revenis al familio Monselet por vespermanĝi . Ĉiun tagon mi iradis dormi tre malfrue.

24.6 vendredo : denove bela tago, alvenis Françoise Fouquet per aŭto kaj ĉirkaŭ la 11-a horo kaj duono ni veturis al kastelo Langeais. Estis tre varme. Ni daŭrigis nian vojon kaj vizitis muzeon Maurice Dufresne, kie ni pasigis preskaŭ 2 horojn. Tiu muzeo plaĉis al mia edzo Tomáš. Poste, ĉe Françoise en Luynes ni tagmanĝis, ripozis kaj babilis. Vespere ĉirkaŭ la 6-a ni iris en loko, kie oni preparis budojn kaj ĉion necesan por koncerto kaj ekspozicio de diversaj aĵoj. Ni revenis en Chanceaux, kie ni vespermanĝis. Ni parolis pere de Skype kun nia filo Stanislav kaj lia amikino Zuzana. Agrabla tago.

25.6 sabato : kiel kutime varme. Matene ni vizitis la ĉiovendejon Super U, kie ni aĉetis multe da aĵoj. Poste ni veturis en Tours viziti fratinon de Jacques.



Ĉar estis bela tago, ni promenis en botanika ĝardeno, kie estis agrabla promenado. Posttagmeze ĉirkaŭ la 3-a ni veturis en

Luynes, rigardi festivalon en ludejo, tie estis tre interesaj aĵoj en budoj de artistaj laboristoj. Ni vidis kiel oni elfandas sonorilon. Ni revenis hejmen en Chanceaux vespere. Post vespermanĝo ni promenis en la vilaĝo kiel ĉiu vespero.

26.6 dimanĉo : post matenmanĝo je la 10-a ni veturis kun Jacques en Luynes al Françoise. Tie ni prenis sidlokon en auto de Françoise kaj ni vizitis preĝejon en L'Ile-Bouchard, kie estis pilgrima meso je la 11-a kaj 15 minutoj. Ni aĉetis multajn aĵojn en la magazeno « Librairie Notre-Dame ». Posttagmeze ni revenis en Luynes kun Françoise kaj tagmanĝis. Ni ripozis, babilis kaj estis ni bone. Mi admiras Françoise, kiom ŝi havas energion kaj optimismon en ŝia ago. Tuta tago estis tre varme : 34 gradoj. En Chanceaux ni revenis vespere kaj ni vespermanĝis ĉe Jacques kaj Marie-France kun ilia nepo. Nia vespera promenado finis nian belan tagon.

27.6 lundo: la tempo pasis tre rapide, kaj ni volis viziti ankoraŭ mian amikinon Solange Fillon en Saint-Cyr sur Loire. Ni iris ĉe Solange nur unufoje. Estis tio agrabla vizito por



ni, ĉar ni vidis multe da pentraĵoj, kiun Solange pentris. Ni restis ĉe Solange longe, ĉar ni rigardis ankaŭ ŝian ĝardenon, kaj ni fartis bone. Je la 5-a posttagmeze ni vizitis ankoraŭ ĝardenon en Saint-Cyr sur Loire. Post tiu vizito ni daŭrigis nian vojon al filino de Jacques kaj Marie-France. Estis tio kara momento. Vespere ni revenis en Chanceaux, kie ni vespermanĝis kaj iris en promenado. Ni vizitis ankaŭ tombejon. Tie estas bela tombejo, tute alia ol en Moravio aŭ Irlando. Vespere ni sidis antaŭ domo kaj ni babilis kune.

28.6 mardo: ni matenmanĝis kiel kutime, ni trinkis nigran kafon kiel en Šumice. Mia edzo kaj najbarino aĉetis en Super-U, poste ni ĉiuj vizitis parkon en Tours, kie ni promenis tutan antaŭtaggmezon. En parko estis multe da junaj homoj, kiuj veturis per rulglitiloj, bicikloj aŭ kiuj kuris. Posttagmeze post ripozo ni veturis al kastelo Chinon. Ni supreniris al la kastelo per lifto, tio ne lacigis nin. Ni trairis



tutan kastelon kaj poste ni aĉetis en la urbo Chinon kelkajn donacetojn. Ni ripozis ĉe biero en urbo. Plua agrabla tago, sed estis tio la lasta tago de nia libertempo.

29.6 merkredo : post matenmanĝo ni pakis kaj preparis niajn valizojn por la revenvojaĝo. Je la 9-a matene ni foriris el Chanceaux kaj ni atendis autobuson en Tours por nia vojaĝo al Prago. Nia aŭtobuso havis duonhoron da malfruiĝo. Ni disiĝis, ni adiaŭis niaj geamikojn Jacques, Marie-France, Françoise, Solange kaj Pierrette. Je la 2-a posttagmeze ni



estis en Parizo kaj poste ni daŭrigis trans Strasburgo ĝis Prago, kie ni estis la 30-an je la sesa horo. Ni prenis metroon ĝis sekvanta haltejo, kaj je la 6-a kaj 48 minutoj ni foriris trajne el Prago ĝis Uherský Brod per senhalta trajno. En Uherský Brod atendis nin filo de Maria kaj hejme en Šumice ni estis je la 11-a kaj 40 minutoj.


Fina impreso : ĉio estis perfekte preparita por ni, ni ne havis duonan tagon liberan. Mi volus danki ĉiujn miajn geamikojn en Francio, precipe Jacques, Marie-France, Françoise, kiuj preparis por ni bonegan libertempon. Mi trovis en Francio novajn esperantistojn.

Kun koran saluton por ĉiuj esperantistaj francaj geamikoj en Tours.

Sincere, Helena.

■ ● ■ ● ■ ● ■ ● ■ ● ■

Malbonodora rozo



Aparta produkto de la kamparoj, kiuj ĉirkaŭas la urbon Sulmono, kie mi loĝas, estas ajlo (**Allium sativum**). Temas pri tipo, kiu pro intense roza koloro nomiĝas ***ruĝa ajlo***. La lokaj kamparanoj semas ĝiajn erojn aŭtune por rikolti novajn bulbojn somere kaj plekti ilin per longaj plektaĵoj. Ĉi tiu produkto, tre estimata ne nur en Abruco, estas uzata precipe kiel spico por kuiradi. De ĉiam popola tradicio atribuis al ĉi tiu humila vegetaĵo diversajn miraklajn ecojn.

"Ajlo estas bonfara kiel dek patrinoj" laŭ hinda proverbo, dume en anonima angla herbolibro oni legas "Ajlero estas mia kuracisto".

La unua citaĵo pri la kuracaj ecoj de ajlo aperis antaŭ 5.000 jarojn sur sumeranaj tabuletoj. Ĉinoj aprecis kaj disŝutis ĝin sur la sanktoferajn ŝafidojn por pli bone akceptigi ilin de dioj.

En la homera Odiseado Uliso maĉis ajlon por reakiri la fortojn kaj kontraŭstari sorĉistinon Circa.

Antikvaj egiptanoj konsumis ĝin tiom, ke ili kromnomiĝis *fetoruloj*. Al konstruistoj de la piramidoj kaj al militistoj longe marŝantaj oni distribuis ĉiutagan porcion de ajlo. Ankaŭ grekoj kaj romianoj uzis ĝin kiel nutrado, medikamento, fortigilo.

En la 18a jarcento, dum pestaj epidemioj en Florenco, Mediĉoj konsilis kunporti je la kolo girlandojn da bulboj por protekti sin de la fetora aero.

Dum la unua mondmilito la angloj versis sur la vundojn ajlsukon kiel desinfektaĵon.

Freŝa studado ŝajnas konfirmi la efikecon de la aktivaj elementoj de ajlo (aliĉino, kalio, zinko, seleno…) kies sciencistoj studas la efektojn sur la kancero, la kapablon mildigi la artritajn simptomojn, la hipotezon kuraci arteriosklerozon, hipertension kaj kolesterolon.

Por kontraŭstari la malbonan elspiron oni konsilas maĉi rosmarenajn kaj petroselajn foliojn aŭ aromajn semojn.

Se oni devus decidi klasifikon inter la supernutraĵoj, la *malbonodora rozo,* kiel ajlo malŝate estis nomita dum Mezepoko, eble alprenus la vicokapon.

Vermiĉeloj kun ajlo kaj tomatetoj

(por 4 personoj)


- Duonigu 500 g. da tomatetoj;
- senŝeligu kaj fritu 12 onojn de ajlo;
- aldonu la tomatetojn, salu kaj kuiru 3 minutojn;
- kuiru 400 g. da vermiĉeloj en bolanta akvo;
- kondimentu per la saŭco kaj baziliaj folioj.

Bonan apetiton !

Franca Cipriani

Nudpieda Gen

Temas pri rakonto plejparte aŭtobiografika, de Nakazawa Keizi, kies patro, fratino kaj plej juna frato pereis en Hiroshimo en 1945.



Li mem naskiĝis en 1939. Nudpieda Gen estis eldonita en la Internacia lingvo fare de Rondo Gen en 1982. Izumi Yukio plenumis la tradukon. En 1983, tiu mangao estis elektita Infanlibro de la jaro.

Jen la rakonto :

Estis en aprilo 1945, en la urbo Hiroshima, preskaŭ ĉe la fino de la dua mondmilito, kiun Japanio komencis fine de la jaro 1941 kontraŭ Usono kaj Britio.

La unua bildo estis tritikoj kiuj portis graĵnojn. Gen kun lia juna frato Sinzi zorgis pri ilin. Tio signifis ke baldaŭ, ili povos manĝi panon aŭ nudelojn. Dum la milito, manĝaĵo estis grava problemo por ĉiuj loĝantoj.

Tre ofte estis aeratakoj.

Daikiti, la patro, devis trejni bambulancoj « por la venko de la Granda Japana Imperio ». Sed li diris « Japanio malvenkos ĉiuokaze. Kial ekzerciĝi pri idiotaĵo ? » La rilatoj inter lia familio kaj la najbaroj estis malbonaj, ĉar li protestis kontraŭ la milito. Li aldiris « Japanio devas vivi pace, amike, surbaze de komercoj. Japanio devas ne militi. La riĉularo pupigis por si la milistaron ».

La rilatoj ene de la familio estis malfacilaj. Du el la kvin gefiloj devis vivi ekstere. Kozi, la plej aĝa devis helplabori en fabriko anstataŭ ol studi en lernejo. Akira devis ekiri por la grup-evakuiĝo en la kamparo. Li loĝis sen danĝero de bombiĝo. La milito disigis gepatrojn kaj gefiloj. Por ĉiuj, La plej grava problemo estis malsato.

Eiko, Gen kaj Sinzi suferis. Aliaj infanoj mokis kaj nomis ilin perfiduloj, ĉar ilia patro kontraŭis la militon. Gen petis « Paĉjo, iru militi, mi ne deziras patron, kiu kontraŭas la militon kaj estas nomata perfidulo ». Lia panjo reagis « Necesas granda kuraĝo kredi je la paco ».

En la lernejo, la gelernantoj devis skribi al la japanaj soldatoj por peti ilin « mortigi multajn usonajn kaj britajn diablojn ». Sed Gen skribis « Japanio devas ne militi, ĉar la milito pereigas homojn. Ne mortu, karaj soldatoj, alie malĝojos viaj gepatroj ». Kaj la instruisto batis lin !

Unu el la najbaroj de la familio Nakaoka estis Sinjoro Pak. Li kunportis al ili rizon kiel donaco. Li estis Koreo, kaj kiam Koreio iĝis japania kolonio, koreoj estis perfortitaj al Japanio por tie labori, aŭ al batalkampo kiel soldatoj. Koreoj kaj ĉinoj estis forkondukitaj por fortigi la japanan militforton, kaj pereis kvazaŭ hundoj. En la minejoj ili preskaŭ ne akiris manĝaĵon. Oni devigis ilin labori en karbejo ĝis-morte. La japanoj faris hororaĵojn en la nomo de la milito. Sinjoro Pak deziris ke la milito finiĝu kaj ke li reiru al Koreio.

Antaŭ la 5a de Aŭgusto, Gen malkovris ligna batalŝipo en la Vitrejo Horikawa. La vitristo diris al Gen « tiu batalŝipo ne estas por vendo ; ĝi estis trezoro de mia sola filo. Li volontuliĝis al la Junulara Brigado, kaj pereis en batalo. Mi metas ĝin ĉi tie por lia MEMORO ; ĝi estas al mi la plej kara trezoro en la mondo » Por helpi la vitristo, Gen rompadis la fenestrojn en la najbaraĵo. Malfeliĉe Gen estis kaptita. La vitristo komprenis : Gen faris ĉion por helpi lin. Li vizitis la gepatrojn kaj diris « Mi deziras donaci la batalŝipon al Gen. Poste Gen donacas ĝin al Sinzi. La patrino diris : « Sinzi estas feliĉega pro la ŝipo. Li iros surakvigi ĝin morgaŭ »

Je la 5a de Aŭgusto dum la nokto, Gen familio estis vekiĝita pro aeratako.

Sed la 6a matene estis bela tago, blua ĉielo, denove aeratako ; ŝajnis la avialdiloj nur skoltis. Ili forfluis. Gen ekiris lernejen antaŭ siaj gefratoj . Surstrate, Gen vidis B-29 aviadilon, kaj strange li ne aŭdis aeratakan alarmon. Subite, falis io blanka ; 43 sekundojn poste, 1800 futojn super Hiroshima, la atombombo nomata « svelta knabo » eksplodis blank-arde, kvazaŭ miliono de fulmolampoj samtempe eklumus. Kvazaŭ hurlaĵo de diablo la atomnubo leviĝis en tri minutoj ĝis 9800 metrojn alte, kaj disvolviĝis. Gen diris « kio okazis ? ĉio estas NIGRA ! ĉu jam nokto ? » La sinjorino apud li mortis, ĉiuj aspektis monstroj ! Domoj brulis. La varmo de la eksplodo fandis la haŭton de ĉiuj, kiuj ne estis ŝirmitaj el la radioj. Gen volis retrovi sian domon, sed lia paĉjo, Eiko kaj Sinzi estis sub la detruita domo, kaj Gen ne povis elliberigi ilin, nur lia Panjo estis savita. La fajro venis, kaj atingis ilian domon. Daikiti, la paĉjo diris « Vi du devas saviĝi, Kimie aŭskultu, nova bebo korbatas en via ventro. Li aŭ ŝi bezonas PATRINON ». Antaŭ ol foriri, Gen donis al Sinzi lian batalŝipon… La panjo frenezis, ŝi volis morti kun Daikiti, kaj Eiko kaj Sinzi. Feliĉe, S-ro Pak, la koreano, povis helpi Gen, kaj porti lian panjon. Kiam ili estis for de la danĝero, la patrino akuŝis, la bebo naskiĝis, ŝi nomis Gen fratinon : Tomoko , kiu signifas « amikino », kaj ŝi diris konklude « MEMORU TION, Tomoko ! Tio deprenis de vi vian patron, fraton kaj fratinon. Tio estas milito. Kiam vi plenkreskos, NENIAM lasu okazi militon, neniam denove. » Punktofino !

Nakazawa Keizi diris al Rondo Gen, ke Gen estas pri atombombitoj, sed ne sole. Li deziris priskribi kaj pridesegni kiel la milito mensoge kondukas la popolon, dirante ke oni devas « kunlabori por la militoj », kaj kiaj devas esti la homaj rilatoj inter gepatroj kaj gefiloj, inter edzo kaj edzino, en plej malfacilaj tagoj. Per la eldono de tiu ĉi libro Rondo Gen deziras aserti, « ke ĉiuj el ni en la mondo responsas por la paco sur nia tero ».

Ni devas memoriĝi pri la 9a artikolo el la konstitucio de Japanio en 1947 :

1.la japana popolo, sincere dezirate internacian pacon bazitan sur justeco kaj ordo, por ĉiam rezignas militon kiel rimedon de ŝtatpotenco kaj minacon par armforto aŭ ĝian uzon por solvi internaciajn konfliktojn.

2.Por realigi ĉi tiun celon, ĝi neniam posedos teran, maran, aeran kaj aliajn militpovojn ; ĝi ne agnoskas la militrajton de la regno.

Jean-Louis Le Brizault

En la Turanĝia Luko n°21, Jean-Louis Le Brizault proponis al vi kompletigi vezikojn kaj aldoni bildon al bildstrio.
Ni ricevis unu proponon de Pino Lalli, kiun ni varme gratulas.



Ĉiuj je 10 : 10 !



Memore de 1884 ?



Korespondaĵoj de leganto de nia tagĵurnalo : La Nouvelle République.

Mia demando sendube ŝajnos al vi mirinda, sed mi ŝatus, ke vi helpu min por klarigi etan misteron. Antaŭ iom da tempo, mia filino irante ĉe horloĝistino de nia urbeto konstatis, ke ĉiuj horloĝoj alkroĉitaj ĉe la muro estis haltintaj je 10 : 10. Ŝi miris kaj la vendistino afablege indikis, ke tiu prezentado de vendota materialo kun la indikiloj je 10 : 10, estis kutimo de la profesio, kiu tiamaniere elvokas la horon, kiam la reĝo Louis XVI estis gilotinita la 21an de Januaro 1793. La historio ŝajnis al ni bela legendo, sed ekde tiu respondo, mi konstatis, ke ĉiuj katalogoj, revuoj montras al ni bildojn aŭ fotojn de aparatoj haltintaj je tiu horo. Do, vere estas kutimo. Sed, ĉu estas vere por memorfesti dum jarcentoj la reĝmorton ?

Claude el Montrichard.

Respondo de la ĵurnalistino Martine Couté :

Estas vere kaj ĝis nun, ni ne rimarkis tion : en la montrofenestro de juvelisto, krom kelkaj, ĉiuj indikiloj, la granda kaj la eta, estas haltitaj je 10 : 10. Viraj kaj virinaj brakhorloĝoj, klasikaj vekiloj, horloĝoj konfirmas la ekzistadon de kodo aŭ de horloĝa tradicio, kiu privilegias tiun prezentadon. Tamen, oni ne povas konkludi, ke la profesio unuvoĉe memorfestas la rememoron de reĝmorto.

La rakonto de tiu historia, tragika epizodo ne verdire kongruas kun la klarigo donita al la filino de nia leganto. Certe ja, Louis XVI estus alveninta al la placo de Grève je 10 : 10, sed, laŭ la ekzekuta protokolo, la reĝo supreniris la eŝafodon je 10 : 22 kaj la gilotino funkciis tuj. Do, oni povas serĉi aliloke la kialojn de tiu komerca prezentado tiel interkonsenta, kiel intriganta.

La elekto de Grenviĉo

Vere, la origino de tiu kutimo ŝajnas ne klare demonstrita. La tre serioza franca federacio de horloĝtekniko estas nedeterminita pri tio. Malgraŭe, unu teorio ŝajnas pli serioza laŭ Interreto :

Ni estas en Oktobro 1884 en Vaŝingtono kaj ekde la unua de tiu monato, 35 deligitoj de 24 ŝtatoj cerbumas, serĉante akordon pri la kreado de horzonoj, la elekto de referenca meridiano kaj la difino de universala tempo.

Post 8 plenaj kunsidoj, kie alfrontiĝas Angloj kaj Francoj (kiuj defendas la elekton de la meridiano trapasante la insulon Ferro), la partoprenantoj sigelas sian ententon precize je 10 : 10. La selekto de la meridiano nul, kiu estas kondiĉo de mondapartigo en 24 horzonoj, estas tiu, kiu trapasas la Grenviĉan Observatorion, proksime de Londono.

Ĉiu lando devas doti sin de leĝa horo valida por la tuta teritorio. Estas paca revolucio kaj la dankema horloĝprofesio estus decidinta konsideri tiun historian horon por prezentado de siaj kreaĵoj al la publiko.

Vere aŭ malĝuste ? Nunaj horloĝistoj preferas reliefigi, ke la pozicio de la indikiloj je tiu fama "10 : 10" estas estetike vere ekvilibrigita sur la platoj. Kiel bele diras kolektanto : « ŝajnas al mi, ke brakhorloĝoj ridas ; kontraŭe je 8 : 20 estas la inverso ». Rideto instigas aĉeti.

(Sekvo sur venonta Turanĝia Luko)

Jeannine kaj Gérard Layseman

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr